

Eŭropa mona konvencio, 2-a parto
Claude Gacond, 119-a radioprelego, 1966.01.12 & 1966.01.15

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas Svisa Kurtonda Radiostacio. Prelegas Claude Gacond pri interesa propono por Eŭropa Mona Konvencio.

Pasintan semajnon mi prezentis al vi proponon por eŭropa mona konvencio farita de franca Stud-rondo nomata **Cercle d'études Lamennais**, kies centro troviĝas en Parizo kaj kies sekretario, sinjoro Maurice Gelly, loĝas en Dol-de-Bretagne.

Tiu stud-rondo proponas kreadon de Eŭropa Kompens-Oficejo kaj de strikte difinita mona metro : spez-unuo nomata **Europa**. La naciaj monoj ne plu valorus ekster la naciaj limoj kaj devus alpariĝi al tiu spez-unuo. Por la internaciaj pagoj interŝtata poŝtĉekkonta oficejo permesus financajn transakciojn sen movo de mono. Mi donis konkretan ekzemplon.

Tiu spez-unuo **Europa** ne povus varii kaj ne estus konto-mono. Estas iomete kiel por nia **Stelo**, kiam ni ĝin nur uzas por kalkuli monajn ekvivalentojn. Tiu nevarieco, tiu konkreta neekzisto malebligas, ke tiu spez-unuo fariĝu objekto por spekulado. Oni ja ne povas spekuli ciferojn sur kontoj en poŝtĉekkontaj oficejoj.

Ne okazus mon-movoj inter la aliĝintaj ŝtatoj, tio estas transmetado de monaj kapitaloj de lando al lando, ĉar la pagoj nur estus skribitaj sur la kolonoj debito kaj kredito de la kontoj de tiuj ŝtatoj. Tio jam okazas interne de ŝtato inter la aliĝintoj al konto de poŝtĉeka oficejo.

Ĉiu lando aliĝinta al la kreota Eŭropa Kompens-Oficejo libere elektus la alparecon, kiu ligus ĝian nacian monon al la supernacia spez-unuo **Europa**. Tiuj alparecoj nur povus esti modifataj, kiam disvolviĝo de la internaj prezoj pravigus tiun ŝanĝon.

La turistoj, do ni, esperantistoj, kaj la aferistoj, dum restado en eksterlando, ne plu bezonus aĉeti eksterlandajn monojn. Ili uzus ĉekojn esprimantaj en spez-unuo Europa similajn al la nunaj vojaĝĉekoj liverataj de la poŝtaj ĉeko-centroj.

Sed tio ŝajnas al vi tre teoria kaj eble malfacile komprenebla. Ni do faru al ni kelkajn demandojn kaj respondu uzante la argumentadon de la Stud-rondo Lamennais.

La unua demando povas esti : Kiel estus fiksita la monaj samvalorecoj inter la landoj ? Ni argumentadu, kiel se Francio, lando de la instigantoj de tiu Eŭropa Mona Konvencio, iniciatus ties fondiĝon. Ĝi tiam verŝajne estus invitita difini sian propran monon rilate al la spez-unuo Europa. Se ĝi ekzemple decidus, ke tiu unuo ekvivalentas 5 frankojn, sin referante al tiu decido, Germanio, Italio, Nederlando elektus ekzemple ĉi sekvajn ekvivalentecon : 2 spez-unuoj Europa egalus 4 markojn, 500 lirojn, 3.75 guldenojn... Tio implikis ekzamenon pri la akirpovoj de la franko, marko, liro kaj guldeno.

Dua demando aŭtomate koncernas la daŭron de tiuj ekvivalentoj. Estas antaŭvideble, ke, kiel por nia Stelo, ĉiujare la landoj aliĝintaj al tiu Eŭropa Mona Konvencio reekzamenus tiujn ekvivalentojn, kiuj ilin ligas al la spez-unuo Europa. La landoj havantaj kreskantan debitoran saldon devus readapti la alparon de sia mono.

Tria demando : Ĉu en tiu sistemo oro konservus sian monan funkcion ? Nenia malhepo ekde la kreo de Eŭropa Kompens-Oficejo malebligus ĝian liberan cirkuladon inter la aliĝintaj landoj, la kurzo de la oro fatale samiĝus en tiuj landoj.

Se ni supozas, ke 1 kg da oro estus kurzigita 300 spez-unuojn Europa, ĝi aŭtomate valorus, pro la monaj ekvivalentoj 1500 frankojn en Parizo, 1200 markojn en Bonn, 187'500 lirojn en Romo, ktp. Se subite en unu el tiuj aliĝintaj landoj la ora kurzo altiĝus, estus precipe indiko de altiĝo de la prez-nivelo en tiu lando. Tiam la alpariĝo al la spez-unuo Europa bezonus revizion.

Eŭropa mona konvencio, 2-a parto
Claude Gacond, 119-a radioprelego, 1966.01.12 & 1966.01.15

Kvara demando : Kio okazus pri la monŝanĝa merkato ? Kiel mi jam klarigis, la naciaj monoj ne plu havus valoron ekster la propraj naciaj limoj, kiel por la naciaj poŝtmarkoj. Do pro tio ili ne plu povus esti submetataj al la ludo de oferto kaj mendo. Ĉiuj internacie fundamentaj monoj : la usona dolaro, la brita pundo, la franca franko, la germana marko, ktp, perdus, profite al la neŭtrala supernacia spez-unuo Europa, sian internacian rolon.

Ĉar la naciaj monoj ne plu estus intervendeblaj, nek ŝanĝeblaj, sed nur alpareblaj al la spez-unuo, tiam ili ne plu estus komparataj sur la internacia merkato. Ili cirkuladus nur en fermita cirkvito, kaj tio ilin savus de la misagoj de spekulistoj. La ekonomia sendependeco de ĉiu lando estus tiel multe pli taŭge protaektata, ol nun.

Nur la prez-alteco estus por ĉiu registaro la konstanta zorgo, ĉar ĝi difinus la alpariĝon.

Ni esperantistoj tion facile komprenas, ĉar inter ni simbole ekfunkcias speco de spez-unuo. Ĉiu esperantisto konas la alpariĝon de sia nacia mono al la Stelo.

La granda diferenco inter la sistemo Stelo kaj la sistemo spez-unuo Europa estas, ke la Stelo fakte estas mono, kiu permesus spekuladon dum Europa ne estas mono.

Do konklude, kiel poŝtmarko bankbileto nur valorus en sia naskiĝlando. Ekster la naciaj limoj ĝi devus cedi la povon al bank-biletoj de la aliaj landoj aŭ al ĉeko skribita en spez-unuoj Europa.

Ĉu vi jam provis uzi eksterlandan poŝtmarkon ĉe la poŝtoŭicejo ? Se jes, tiam oni rimarkigis al vi ĝian absolutan senvalorecon. Vi nur povas ĝin ĵeti aŭ ĝin realporti en ties naskiĝlandon.

La samon proponas la Stud-rondo Lamennais por la monoj. Kaj tiu propono ne nur raciigus la internaciajn financajn kontaktojn, ĝi permesus al la registaroj pli facile kontroli sian mon-situacion, ĉar per la nacia Centra Ĉekoficejo ili povus kontroli siajn importadojn kaj eksportadojn multe pli precize, ol nun.

Pro tio verŝajne la propono de la Stud-rondo Lamennais havas estontecon antaŭ si.

Dum la venonta elsendo ni donos ankoraŭ kelkajn informojn pri ĝi. Sciu, ke dokumento pri tiu studo estas ricevebla. Do skribu al nia radio por ĝin ricevi.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-